Alexander Puschkin,

Al....

tradukita de Manfredo Ratislavo

Esperantigo laŭ la germana traduko de Karoline Jänisch

Momenton vi ja estis mia,
vi foje staris antaŭ mi,
Vi pura ideal' gracia
de l' belo efemera vi.

Dolor-espere sopirante,
en la bruado de l' homar'
la dolĉan voĉon ekaŭdante,
mi sonĝis pri l' okulo-par'.

Sed dum la viv-batal' multjara,
dum la restado en la sol',
paliĝis la memor' de l' kara
aspekto via kaj parol'.

Mi jarojn en karcero restis,
ne kredis plu je l' kara Di',
malplena mia brusto estis,
ne ploris, vivis, amis mi.

...

Alexander Puschkin,

An ...

tradukita de Karoline Jänisch

Ein Augenblick ist mein gewesen:
Du standst vor mir mit einemmal,
Ein rasch entfliegend Wunderwesen,
Der reinen Schönheit Ideal.

Im schmerzlich hoffnungslosen Sehnen,
Im ew'gen Lärm der Menschenschar,
Hört' ich die süße Stimme tönen,
Träumt' ich das milde Augenpaar.

Allein im Kampf mit dem Geschicke
Und in der Jahre düsterm Gang
Vergaß ich deine Engelsblicke
Und deiner Stimme süßen Klang.

Und lange Kerkertage kannt' ich,
Es ward die Brust mir stumm und leer,
Für keine Gottheit mehr entbrannt' ich,
Nicht weint' ich, lebt' ich, liebt' ich mehr.

...

Alexander Puschkin,

Al...

tradukita de Manfred Retzlaff

Esperantigo laŭ la rusa origina teksto.

Memoras ofte mi pri tio:
aperis iam vi al mi,
samkiel fuĝa mir-vizio,
de l' pura belo la geni'.

En la turmentoj de l' amaraj
afliktoj kaj melankoli'
aperis viaj trajtoj karaj,
la mildan voĉon aŭdis mi.

La jaroj pasis, forbloviĝis
subite tiuj sonĝoj ĉi,
la belaj trajtoj ekpaliĝis,
forgesis vian voĉon mi.

Kviete pasis tagoj miaj
en la ekzil', sen emoci',
sen Dio, sen inspiroj iaj,
ne ploris, vivis, amis mi.

...

Saniĝas nun animo mia.
Vi ree staras antaŭ mi,
vi pura ideal' gracia
de l' belo efemera vi.

Nun ree batas kun pasio
La vekiĝinta kor' en mi,
denove ardas ĝi por Dio
kaj vivas, ploras, amas ĝi.

Traduko de la Rusa poemo "K...." de Alexander Puschkin *(∗1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984-05.*

MR-153-2a / Arg-305-618 (2006-09-20 09:31:05)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, faris laŭ la germanigo de s-ino Karoline Jänisch (Pawlowa).

Es darf die Seele nun genesen:
Und du erscheinst zum zweitenmal,
Ein rasch entfliegend Wunderwesen,
Der reinen Schönheit Ideal.

Und wieder schlägt das Herz voll Weihe.
Sein Todesschlummer ist vorbei,
Für eine Gottheit glüht's auf's neue,
Es lebt, es weint, es liebt auf's neu.

Traduko de la Rusa poemo "K...." de Alexander Puschkin *(∗1799-05-26 – †1837-01-29) en la Germanan de* Karoline Jänisch *(Karolina Pawlowa).*

Arg-305-617 (2005-04-22 16:38:07)

Vekiĝis nun animo mia,
kaj ree ekaperis vi,
samkiel fuĝa vid' vizia,
de l' pura belo la geni'.

Nun ree batas kun sentemo
en mia brusto mia kor',
inspir' revenis kaj kredemo
kaj viv' kaj am' kaj ree plor'.

Traduko de la Rusa poemo "K...." de Alexander Puschkin *(∗1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2006-09-20.*

MR-153-6 / Arg-305-730 (2006-12-04 12:17:37)

*Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, *04.11.1938) en Decembro de 2000 laŭ la origina rusalingva teksto.*